István Szabolcs:
***Kelkaj viv-eroj de iu s-ro P.***

## 1. Signoj

Sinjoro P. kaptis ĉiujn signojn de la alia mondo.
La signoj de la Alia Mondo estis ricevitaj en dormo; tiuj de aliaj mondoj en maldormo. Eble temas pri sopiro, ne tiom pri specifa loko.
P. ĉiam atingis ĉi-punkton kiam li ekis novan rakonton kaj atendis la signon... el iuj aliaj mondoj.
Se ĝi ne venos, tiam li rekomencos la verkadon, aŭ malfermos sian ŝatatan romanon en la kutima loko. Estas pluraj el tiuj, do li elektas laŭ sia humoro aŭ hazarde.
P. ĉiam portas ilin kun si, kiel tiujn lokojn, kien li sopiras iri aliamonde. Tio estas feliĉo, ne hazardo.

## 2. Latine

Sinjoro P. veturaĉis per buso al la rivero Kwai. Kunvojaĝantoj ridetis al li, ĉiuj estis travojaĝontaj la fervojlinion, dum li sola volis viziti tigrorezervejon.
Ili ŝajnis dubi revidi lin hejmenirante al Bangkoko. Li celis iri ja al ”areno”, kvankam li tute ne aspektis gladiatoro.
Juna hindia paro sidis apude – novgeedzoj, iom timemaj. Laŭvoje ĉie staris arboj kun flamruĝaj floroj, unuope aŭ en aretoj.
„Kio estas tio?”– li demandis la junulon.
„Flamarbo, lokuloj nomas ĝin *gulmohar*” – venis la respondo.
„Reĝa deloniko, latine *delonix regia*” – aldonis la sinjorino.
Sinjoro P. radiis ravite.
Grati tigrodorson estis poste nur ĉerizo sur la kuko.

**3. Loterio**

Ĉiu oka persono, t.e. dek miliardoj. Ĝi estis decidita per demokratia elekto. Partopreno estis laŭvola. La rendimento de plia nombro jam ne aldonus al la rezulto.
La evento okazos la 28-an - kiu estas la dua perfekta nombro. La cerboj de dek miliardoj da homoj kunfandiĝos en porcele konstruitaj centroj.
Ĝis nun, ĉiu voko rezultigis la nombron 42, tree je la ĝojo de la arkeologoj.
Ĉi tio estos la oka provo, kiu estas la unua perfekta nombro, kaj lia debuto.

Sinjoro P. iris do al loteriejo kaj enmanigis sian loterian bileton: unu, ok, dek, dudek ok kaj kvardek du.

**4. Memo**

P. longe pensis pri si, ke li estas nek aroganta, nek ambicia.
Iam li fine diskutis la aferon kun sia interna memo kaj konfesis la malon.
Tamen P. insistas, ke nur havas li planojn ambiciajn.
Kelkfoje, kiam li enlitiĝas kaj estas ekdormonta, la fermitaj palpebroj subite blankiĝas aŭ malpeziĝas.
Tio okazas tute ne ĉiutage, li preskaŭ devas atendi tion kiel finon de fasto.
Kiam tio okazas, li apenaŭ povas alkutimiĝi. Tio blindigas mirinde…
Jen la rekonstrua tolo.
La tria memo kiu aperas sur tiu ekrano en liaj sonĝoj, pensas pri la unuaj du, ke ili nur sonĝas ilin.

**5. Krome**

Sinjoro P. superstiĉe timis porti sian rubon al la nova jaro, do li jam seniĝis de ĝi la antaŭajn tagojn , li povis esti trankvila je tio.
Kvankam li jam vekiĝis dufoje, sed ambaŭfoje  reendormiĝis, lia edzino profunde ronketadis apud li.
Tri kontinentoj kun grandaj eventoj atendos lin kaj laŭroj. Almenaŭ tiel
li imagis al si la novan jaron – en la lito.
Li ellitiĝis nekutime malfrue la lastan tagon de la jaro.
Seka tuso sufokadis lin. Por la nova jaro, li estis certa
pri preskaŭ ĉio, krom ĉu li supervivos ĝin.
Du tagojn antaŭ Kristnasko alvenis diagnozo: karcinomo.